Negende Jaargang, Nummer 3 Verschijnt maandelijks 13 Maart 1937

# LABORISTA ESPERANTISTO
ARBEIDER ESPERANTIST

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

Redactie: Middenweg 226, Amsterdam-O. || Secretariaat van de Fed. van Arbeiders-Esperantisten: Postbus W 6, Amsterdam-W.
Administratie: Postbus O. 50, Amsterdam-O. || Postgiro Amsterdam 144698. || In België: Esschenstraat 16, Antwerpen

Abonnementsprijs f 0.75 per jaar. Voor leden gratis. Oplaag 7650 exemplaren.

## PROMENADO TRA GENT.

La Kongresejo, Festejo de la Social-Demokratoj, troviĝas en la proksimeco de la estinta Suda Stacidomo, kiu estis forkonstruata en 1928. Nun estas tie moderna parko. Nia promenado kondukas nin tra la Korte Dagsteeg, kies nomo devenas de la „Oudaghesteen" (Steen = kastelo), kiu iam staris tie. En la mezo de tiu strato troviĝas kinejo, iama kapelo de la lanteksistoj. Pasante la Vogelmarkt ni alvenas sur la Paradoplaco (Kouter). Iam tiu granda placo estis ĉevalvendejo. Ĝi servas nun, dimanĉe kiel florvendejo kaj koncertejo. Dum la ĉiujaraj Gentaj Festoj okazas tie popolbaloj. Tiam la placo estas ornamita kaj lumigita vespere. Estas la loko de la Bankoj, 7 oni povas trovi tie. Noj. 28 kaj 12 estas atentindaj malnovaj konstruaĵoj el la 18a jarcento troviĝantaj sur la monumentolisto. Tiu monumentolisto enhavas 447 antikvajn konstruaĵojn el kiuj 48 unuarangajn.


Ni venas en la Schouwburgstraat kie estas la Franca Teatro. Ni preterpasas la Justicpalacon el 1846.

Tra la Veldstraat, kie estas kelkaj belaj fasadoj el la 18a jarcento, ni alvenas sur la Koornmarkt, la kuvo (= centro) de la urbo. Ni vidas unue la Sankta Nikolao-preĝejon, antikvan konstruaĵon enhavanta kelkajn pentraĵojn el la 17a jarcento kaj belege pentritajn fenestrojn. Ĉirkaŭ la placo staras mezepokaj domoj kun vidindaj fasadoj. La Poŝtejo, unue la urba malliberejo en 1894 fariĝis la Centra Poŝtoficejo. Trans la St. Michielsponton de kie ni havas belan rigardon ĉirkaŭe, ni alvenas al la Koornlei, la unua haveno de Gent. Je la alia flanko de la kanalo (Graslei) staras la konataj gildo-domoj. Estas serio da tre belaj tipaj konstruaĵoj.

Unu el ili, romanstila, el la 13a kaj alia, de la ŝipistoj, specimeno de la flandra gotiko el la 16a jarcento. Tra la Jan Breydelstraat, ankaŭ kun tipaj fasadoj, ni venas en antikvan ĉirkaŭaĵon, de kiu la Grafa Kastelo ('s Gravensteen) estas la kerno. Ĝi estis la loĝejo de la Grafoj de Flandrujo. Nun ĝi estas muzeo kiu enhavas malnovajn turmentilojn. Sur la Veerleplaats estas la fiŝvendejo kun arte ornamita enirejo.

Ni venas al la Kraanlei; oni povas rimarki tie la Koventon de la Sankta Katharino, iama malsanulejo por virinoj. Ĝi konsistas el unu-etaĝaj domoj. Iomete pli malproksime troviĝas „La Infero" la unua gastejo de la urbo. Trans la „Laktaĵponto"n ni venas sur la Vendredo-vendejo, kie ni vidas: pafilegon, nomita „Dulle Griet", „Ons Huis" popoldomo; statuo de Jacob van Artevelde (Popolgvidinto kaj guberniestro de Flandrujo en la 14a jarcento); la Lanvendejo: iama vendejo de la lantekstistoj; la tipa konstruaĵo, iama gildejo „Toreken". Tra la Kammerstraat ni venas ĉe la Flandra Akademio.

Sur la Zandberg staras komuna pumpilo, konstruita en 1810. La „Konservatorio" estas la iama domo (13a jarcento) de la Familio Van der Sickelen; ĝi fariĝis muziklernejo en 1898. La „Achtersikkel" estas la malantaŭa parto de tiu domo. Sur la Sankta Bavo-placo estas vidindaĵoj, nome: la katedralo St. Baaf (konstruita de 12a-16a jarcentoj) enhavas belegajn pentromajstraĵojn de la fratoj Van Eyck, (la famkonata Adorado de l' Ŝafido Dia), Rubens, Van Dyck kaj de aliaj famkonataj pentristoj; la Flandra Teatro konstruita en 1897-1898; la statuo de Jan Frans Willems, la patro de la flandra movado; la Belfredo (Belfort) kies konstruado estis komencata en 1183, estas 96 metrojn alta. Orumita drako troviĝas sur la pinto de la turo. Famkonata sonorilarludo estas aŭdebla ĉiun sabatvesperon dum somero. Kaj jen ni alvenas al la Urbdomo kies fasado estas konstruita laŭ tri diversaj stiloj gotika, romana kaj renesanca. Belaj murpentraĵoj ornamas la salonojn. Tie finas nia promenado.



Dekstre: Rigardo de la St. Michielsponto al la monumentoserio Sint Nikolaaspreĝejo, Belfredo kaj St. Baafpregejo.





Maldekstre: La Grafa Kastelo

## ESPERANTO KAJ LA FONTOJ DE NUNTEMPA CIVILIZACIO.

Prof. d-ro H. Jokl.

La historia tempo de la homaro komenciĝas per la skribo. Depost la momento, kiam unu individuo povis al alia ne ĉeestanta komuniki siajn ideojn, fariĝis la plej granda renverso en la kultura stato de la homoj. La historia tempo ekestis. Same grandioza kultura renverso okazis, kiam ekfunkciis Esperanto, la lingvo de la tuta homaro. Kial? Ĉu ne estis jam antaŭ Esperanto universalaj lingvoj? Ĉu ne estis lingvo babilona mil kvincent jarojn la interpopola lingvo de l' tuta Antaŭa Azio? Ĉu ne estis la greka lingvo interkomprenilo de Balkano ĝis Pamiro post la venka militiro de Aleksandro la Granda? Ĉu ne estis la lingvo de romaj verkintoj, preskaŭ du jarmilojn, la lingvo de civilizitaj homoj? Ĉu ne estas la lingvo de la franca kortego lingvo de la kultura mondo, same kiel ĝi estas lingvo de la diplomatio? Ĉu la angla lingvo ne estas parolata en ĉiuj kontinentoj ne nur de la angloj mem, sed ankaŭ de indiĝenoj de iliaj kolonioj? Ĉu ne estas la ĉina lingvo parolata de unu kvarono de la tuta homaro?

Ĉu ne arogas la esperantistoj al si tro grandan gravecon kaj memkonfidon?

Ne, la lingvo babilona ĉesis kun la babilona potenco, la greka lingvo ne eniris en la vivon de nekleruloj, la latina lingvo rompiĝis en vivajn dialektojn kaj kio restis — fariĝis senviva. La franca lingvo ĉesas esti tiom aktuala en la internacia vivo, kiom ĝi estis antaŭe. Internacia lingvo certagrade fariĝis la lingvo de angloj, ĝi estas la lingvo de komerco. Pri la lingvo de ĉinoj oni ne parolu, malgraŭ la granda nombro de ĉine parolantoj, ĉar ĉine parolas nur ĉinoj, ĝi ne povas fariĝi lingvo internacia. Ĉinoj estis dum tro longa tempo nacio ekskluziva, kaj pro tio ili eliminiĝis el la internacia vivo. La ĉina popolo rigidiĝis.

Kaj nun ni estas ĉe la kerno de la afero. La morto estas rigida, la vivoelemento pulsanta! Ankaŭ la babilonasiriaj kulturoj rigidiĝis, rigidiĝis la kulturo greko-bizanta. Oni rigardu nur la eterne samajn, kliŝajn bildojn grekobizantajn, oni rigardu la senvivan vizaĝesprimon de iliaj mozaikoj, ilian laŭformulan senmovan literaturon kaj oni povas diveni, kial tiu ĉi ŝtato falis antaŭ la tiamaj junaj turkaj barbaroj.

La latina lingvo de mezepoko ne povis rekreiĝi, ĝi ne sufiĉas por la rapida evoluo de la sciencoj kaj faris lokon al la vivantaj lingvoj.

Ne estas necese tie ĉi demandi, ĉu universala lingvo estas bezonata. Ne nur la plej primitivaj popoloj pensas hodiaŭ, ke la aliaj ne estas same indaj homoj. La *bantunegroj* sin nomas „homoj", tion signifas la vorto bantu. Kiu ne estas bantunegro, ne estas homo, laŭ ila idiomo. La *eskimoj* sin nomas *„inuit"*, tio estas en ilia lingvo „homo", la loĝantoj de insularo Andamana, pigmea popolo, sin nomas *„minkopie"*, kio ankaŭ signifas „homo". Kiu ne estas pigmeo, ne estas inda kreitaĵo, ne estas homo.

Tiel pensas aŭ povas pensi homoj sen iu ajn kulturo. Sed esperantistoj scias la veran kontraŭon. Nia homa civilizacio estas konglomeraĵo de ĉiuj kulturoj de tempoj pasintaj kaj de kulturoj de ĉiuj popoloj de la tuta mondo.

De la negroj ni ekkonis la prilaboron de la metaloj; estas vero, la negroj procedas ĉe tio ankoraŭ hodiaŭ kiel en tempoj praantikvaj, al propa malutilo, sed malgraŭ tio ili al ni donis la eblecon de la transiro de kultura epoko ŝtona al la kulturo metala. Sed jam en la epoko noveŝtona, t. n. neolitika scias la homoj kulturi la teron, ili estas jam kampuloj, ne mortas pro malsato, se ili ne havas feliĉon mortbati sufiĉe da sovaĝaj bestoj. Tiun scion pri grenkulturado kaj bredado de hejmbestoj alportis al si la homoj de la regionoj, loĝataj de la flavuloj. Sur la deklivoj de la montaro Altaja kreskas sovaĝe la tritiko, la hordeo kaj la sekalo kaj en la samaj regionoj vivas ankaŭ sovaĝe la familio de bovo, nia plej grava besto nutranta. De tie ĉi, de Centra Azio alvenis al ni la homo kulturanta en paco la dian teron jam en la tempo de la kultura epoko neolitika.

En la epoko bronza la homo prilaboras en Egiptujo la unuan fojon la ŝtonon per metalo — li fariĝas konstruanto de ŝtonaj domoj. Konstrui domojn el ŝtono ni lernis de antikvaj egiptoj. Ili estas ankaŭ la inventistoj de la vitro kaj de la papiruso, kiu estis en Ĉinujo perfektigita en la pli praktikan paperon. Al ĉinoj ni dankas la kompason, porcelanon kaj la pulvon. La vorto *bronzo* devenas de la nomo de la latina urbo *Brundisium,* hodiaŭa *Brindisi* en la suda Italujo, kie estis proverbe grandaj fabrikoj de tiu ĉi malmola metalo. En bronza epoko estis jam la homoj metiistoj kaj komercistoj. De Anglujo kaj de Hispanujo ili aĉetis la stanon kaj ankaŭ de la alpaj landoj de hodiaŭa Salzburg ekzemple, sed ĉefe de la insulo *Kypro* oni aĉetadis *kupron* kaj miksis el ĝi kaj el la stano la bronzan miksaĵon. La mastroj de la navigacio, niaj ŝipoinstruistoj estis la popolo, kiun ni hodiaŭ kun granda danko rememoru, ĉar ili donacis al ni la plej valoran inventon, la simplan alfabeton — tio estas la *fojnikoj.* Ni konsciiĝu, ke la ĉinoj bezonas lerni okdek mil signojn parkere, por ke ili povu skribe esprimi sian lingvon. Ni konsciiĝu, ke ili devas lerni la tutan vivon, por ke ili scipovu tion, kion ĉe ni scipovas la infano en la unua lerneja jaro. Ke tio estas ebla, tion ni dankas al la fojnikoj, kies alfebeton ni plejparte uzas. Nia divido de la tempo, nia kalendaro estas babilona; iliaj astronomoj dividis la jaron en monatojn, monaton en kvar semajnojn po sep tagoj; la monoteismo nomis la sepan tagon de la semajno sabaton, tio estas tago de ripozo. Kaj se eĉ la malriĉa, kompatinda homa kreitaĵo unufoje en la semajno povas solene konduti, festi tagon de Dio, tagon de rekreacio, tagon de respiro kaj ĝojo kaj ĝuo — tion ĝi dankas al la popolo juda. Kien ne trapenetris la monoteismo, tie ne ekzistas dimanĉo, tio estas „dies dominica", tago de la Sinjoro. Dimanĉo ne ekzistas en Hindujo, en Ĉinujo, en Japanujo kaj la homoj tie estas alforĝataj al la servuto de unu tago al la alia sen ripozo, sen riproĉo de la konscienco. Al japanoj ni dankas la modernan, aeran kaj luman loĝadon. Loĝadon sen superflua meblaro. Al la persoj ni dankas la arton de konstruado de la ŝoseoj. Reĝo Darius (Darajavauŝ) estis la unua reganto, kiu instalis la poŝton. *Krojsos,* reĝo de lidoj, estis la unua, kiu stampis oran monon. Kaj ĝi estis granda invento. Ne estis plu necese ŝanĝi kupron je stano, se oni volis havi bronzon, oni donis iom da oraj moneroj, kiuj estis malmulte pezantaj kaj ne okupis multe da loko, per kiuj oni povis je malmultaj moneroj aĉetadi kion ajn. La inventon de la mono ni dankas al la malaperinta popolo de la proverba riĉulo Krojsos, tion oni povas preni simbole. Superflue estus rememorigi, kion ni dankas al la grekoj, al la popolo, kiu estas rajte konsiderata kiel vera fundamento de nia kulturo, estus superflue menciadi la popolon roman, kies lingvo liveris tri kvarojn de la vortoj por universala lingvo Esperanto, ĉar laŭfakte tiuj ĉi vortoj estas la pruvo, ke nia civilizacio estas bazita sur la kulturo antikva. Sed ne estas al ni eble ne memorigi la popolon, per kies malkovro komenciĝas la nova epoko, la indianojn. Tiu malriĉa, malfeliĉa popolo liveris al ĉiuj malriĉuloj de la mondo la plej gravan donacon, la ekkonon de la terpomoj. Depost la importo de la indiana manĝaĵo terpoma ĉesis en Eŭropo la pesto pro malsato. Tiu ĉi malsano forrazis en mezepoko tutajn vilaĝojn, urbojn kaj eĉ regionojn. La malsato kaj ĝia akompananto, la

pesto, forbuĉadis infanojn, virinojn kaj virojn, homon kaj beston, restadis post ĝi nur malplenaj ruinaĵoj. Al amerikaj indianoj ni dankas, ke ni eĉ ne estante riĉaj povas satmanĝi, al la lando de indianoj ni dankas, ke, eĉ ne estante riĉaj, ni povas varme vestigi nin per alia ilia plantaĵo — la kotono.
Ne estas en la mondo popolo, kiu ne estus kontribuinta al la tutmonda civilizacio. Kelkaj popoloj pro tio estas glorataj, aliaj ne rekonataj, sed ni esperantistoj havas la eblecon lasi paroli la anojn de ĉiuj popoloj de la mondo. Ni volas ilin aŭdi, ili parolu pri sia historio en lingvo ĉie komprenata, ĉie same egalvalora, same egalrajta, same internacia, ĉie same homa kaj poste montriĝos, ke Esperanto ekfunkciinte komencis la plej grandiozan kulturan renverson, ĉar per la lingvo de la homaro naskiĝis la epoko de la homaro mem.
(Tiun ĉi interesan artikolon ni dankas al Verda Revuo, Aŭstrio, el kiu interesa gazeto ni ĝin represis. Red. L E.)

## NAIVULOJ.

Nian movadon oni opinias de multaj flankoj konsistanta el naivuloj. La kaŭzoj estas diversaj. Tial ni, laboristaj esperantistoj, klopodas ĉiurilate organize kaj serioze aranĝi niajn laborojn. Sen troigo ni rajtas konstati, ke la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la nederlandlingva regiono atingis altan por esperanto-organizo nivelon. Tiu konstato ne okazas por akiri laŭdojn pro tio, sed por montri, kiel naiva ankaŭ ni spertas, ke ankoraŭ estas la esperantomovado, ne malplej la burĝa, neŭtrala, ĝenerala aŭ kiel ajn oni ĝin titolas.
Sufiĉas trafoliumi la multajn gazetojn enhavantajn faktojn pri la progreso de nia esperantomovado, kiujn ni ofte utiligas en la propagandcelaj informoj por la nederlanda gazetaro. Kaj ni konstatas, ke rilate al la informado, necesa por havigi materialon en la propagando, la t.n. mondgazetoj kaj revuoj liveras malplej kaj cetere nur naivaĵojn aŭ misinformojn. Inter ili ni nomu „La Praktiko” kaj „Heroldo”. La lasta ekzemple diras, ke „la nederlandaj esperantistoj” ĉijare kongresas en Den Helder. Ĉu naivaĵo? Ne, tio estas malvero kaj misinformo. La redaktoro kiu pretendas ludi rolon en la esperantomovado per tia semajna gazeto, kaj eĉ mem loĝas en Nederlando, kiu regule ricevas nian organon „Lab. Esperantisto”, *scias*, ke nur parto, eĉ la plej malgranda parto, de la nederlanda esperantistaro kongresos en Den Helder. Tie okazos la kunveno de la neŭtrala asocio LEEN.
La redaktoro de „Heroldo” scias, ke la plej granda esperanto-organizo en Nederlando, la Federacio de Laboristaj Esperantistoj, nunjare kongresos en Gent, dum en la pasinta jaro ĝi bezonis la plej grandan salonon en Hago kie venis tiom da centoj da anoj (1250) kiom da dekoj ĉe la aliaj. Ĝi ankaŭ scias, ke *la* nederlandaj esperantistoj *ne* estas la neŭtralaluloj. Tiu aroganteco vivas ankoraŭ ĉe multaj el la UEA-IEL regionoj, kiuj nin konsideras esti „nur” fakaj organizoj. Tre grava naivaĵo. Longajn raportojn oni povas legi en nomitaj du gazetoj pri „la movado” en diversaj landoj, ankaŭ pri Nederlando. Simplaĵojn pri organizitaj paroladoj, lumbildvesperoj, kursoj kaj kursetoj kun precipe la nomoj de gvidantoj, enhavas tiuj gazetoj abunde. Sed gravajn informojn oni vane serĉas pri la diversaj organizoj kaj malplej pri la laborista esperanto-movado. Ekzemple pri Nederlando ni regule trovis diversajn lokajn sciigojn pri neŭtralaj kluboj kiuj tamen ne donas kompletan bildon pri agado kaj rezultoj en iu lando.
Nenie oni trovas iun detalon el la jarraportoj de nia Federacio, kiu estas unu el la malmultaj kiuj regule kaj detale publikigas ilin. Nenio pri nia kreskado en kelkaj jaroj de la plej malgrava ĝis la plej granda esperanto-organizo nun havanta 4600 membrojn. La legantoj ne bezonas scii, ke nia Federacio sukcesis fondi 27 novajn sekciojn en la pasinta jaro kaj nun nombras 152 kiuj kapablis aranĝi 310 kursojn kun 5600 kursanoj, inter kiuj 52 infankursoj kun 1000 infanoj, post 100 ekspozicioj kaj 80 propagando-kunvenoj kaj disdono de preskaŭ miliono da flugfolietoj kaj aliaj propagandaĵoj, eldono de 10.000 broŝuroj ktp ktp. Ni ne denove mencios niajn raportojn kiujn tiuj redakcioj, ne komprenantaj sian taskon, simple pretervidis. Ĉu ili hontus devi mencii, ke ni laboristoj certagrade kapablis fari pli ol fanfaronantaj neŭtraluloj? Per tia strucpolitiko oni tamen malfavoras ĝenerale la esperanto-movadon. Kuraĝe informu la mondon, ke nia Federacio vendis 6700 lernolibrojn en la pasinta jaro kaj multajn milojn da aliaj esperantostudaĵoj, ke nia kotizo-enspezo en unu jaro estas pli ol 7500 guldenoj, kaj la vendo de esperantolibroj atingas la sumon de 17.500 guldenoj, ke ni liveras al ĉiuj niaj membroj senpage du gazetojn, ĉiumonate dudek paĝojn, ke ni estas la sola organizo en la tuta Esperantio kiu eldonas krome ĉiumonatan 8-paĝan studorganon kaj infangazeton.
Kiu komparas la kurzon de la guldeno kun alia valuto komprenos la valoron de niaj spezoj. Neniu organizo kapablis, kiel nia Federacio, varbi al abono de sia gazeto 2500 kursanojn, kiu organo sekve nun havas monatan eldonkvanton de 7500 ekz., dum ĝiaj sekcioj posedas pli ol 20 ciklostilitajn monatgazetojn de kiaj diversaj esperanto-organizoj apenaŭ unu havas. Ke ni dum kelkaj jaroj jam ĉiudusemajne havas radioelsendojn, oni ne mencias, sed per dikaj literoj ofte estas menciataj „sukcesoj” por unu aŭ kelkaj fojoj de aliaj organizoj.
Ni ne konsideras la „malgrandan” laboron negrava, kontraŭe. Sed per nemencio de la organizo-progresoj la redakcioj kaŭzas neĝustan impreson. Pri la bona agado de BEA (Brita Esperanto Asocio), pri la du agemaj organizoj en Svedio, la laborista kaj neŭtrala, pri fakte neniu *organiza* laboro „Praktiko” kaj „Heroldo” informas krom pri pompaĵoj. Sed ankaŭ ne en la „naciaj” neŭtralaj esperantogazetoj troviĝas tiaj informoj, nek pri aliaj, nek pri propra lando ofte ne pri propra asocia laboro. Dum ĉion kio ne apartenas al la UEA-IEL-movado oni prisilentas. Ni povas noti multajn tiajn faktojn. En Nederlando same la neŭtrala organizo neniel informas siajn membrojn pri la progresoj kaj aliaj konsiderindaĵoj de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj. Ĉu pro envio aŭ timo ke ties membroj iom sentus por la Federacio? La gazeto „Nederlanda Katoliko” ofte mencias kun respekto nian laboron, sed la neŭtraluloj restas ne-informitaj. La Federacio tamen komprenas, ke plena informado nur favorigas la movadon. Tial ĝi ĉiam senrezerve publikigas ĉion menciindan ankaŭ el neŭtralaj kaj aliaj rondoj. Eĉ estas nun fakto, ke la neesperantistoj en Nederlando, per la publikaĵoj fare de la Federacio 2 x semajne en Arbeiderspers (soc. dem. ĵurnaloj), havantaj pli ol 200.000 abonantojn, pli bone estas informitaj ol la esperantistoj per siaj esperantogazetoj!
Se tiaj gazetoj, kiaj la menciitaj, estus agintaj same, ili certe jam akiris pli bonan rezulton. Kaj tiaj gazetoj estas nomitaj „La Praktiko” kaj „Heroldo”!




**20 Maart 1937, 4.30 uur, Hilversum.**
In de uitzending van de Fed. v. Arb. Esp. spreekt de Amerikaanse wereldreiziger en journalist J. Scherer in het Esperanto over zijn bevindingen in verscheidene landen. Laat deze gelegenheid niet voorbijgaan !

**Cursus van ambtenaren.**
Onder leiding van H. Broekhuizen Sr vindt in Den Haag een cursus plaats voor ambtenaren van Maatsch. Hulpbetoon, hetgeen we hier als een navolgenswaardig voorbeeld vermelden.

# Een Congrespraatje.

Nu we de voorstellen voor ogen hebben met de amendementen, willen we trachten, door ze hier eens nader te bekijken, de discussies in te leiden, om een zo vlot mogelijke behandeling te waarborgen, opdat er voldoende tijd blijve tot het bezichtigen en genieten van hetgeen onze congresstad biedt, voor *alle* congresbezoekers.

Hier zijn we meteen bij een voorstel aangeland, dat wel niet het voornaamste, maar toch wel in zekere mate belangrijk mag heten, n.l. om onze congressen in de toekomst niet met Pasen doch op de Pinksterdagen te houden. Zo onschuldig het lijkt, heeft het toch z'n voor- en tegenstanders, welke laatsten menen, dat men in congres bijeenkomt om te vergaderen en niet om te genieten. De kans op mooi weer met de Pinksteren lokt hen niet en zij vrezen, dat men dan de gelegenheid neemt om te spijbelen.
Dat kan waar zijn, maar men vergete niet, dat *onze* congressen niet alleen bezocht worden door afgevaardigden, die tot plicht hebben de besprekingen bij te wonen, maar voor het grootste deel door leden, die deze jaarlijkse esperantobijeenkomsten mede beschouwen als een aangename „renkontiĝo". Zij hebben daarvoor de reis- en verblijfkosten over, maar zijn tevens ook „uit". Wij waarderen dat zij de beraadslagingen toch getrouw volgen. Zorgen wij dat dit zo blijft, door ze niet nodeloos te rekken. Het aangename vergezelle het nuttige. En hierbij is een beetje goed weer niet te versmaden, hetgeen bovendien velen naar het congres lokt, ook op de fiets. En goed bezochte congressen bergen een stuk propaganda in zich zelf.
Bekijken we de practische kant, dan ziet het Fed.-bestuur daar veel voordeel in. Het is niet onmogelijk, dat door het latere tijdstip vele nieuwe leden, tevoren cursist, naar onze congressen zullen komen. Het klaarmaken van de jaarverslagen, opdat die zo vroeg mogelijk gepubliceerd worden, kan in wat rustiger tempo geschieden en voor de behandeling hiervan en de congresvoorstellen blijft dan eveneens meer tijd in de afdelingen. Vinden de desbetreffende voorstellen een meerderheid, dan zal het Federatiebestuur met enkele datumwijzigingen in art. 15 van ons reglement komen.

#### Contributie en nog wat.

Bezien we de voorstellen betreffende de contributie, dan treft ons de volharding waarmee telkenjare enkele afdelingen trachten deze met een halve cent per week te verlagen, waarop telkens opnieuw het Federatiebestuur moet uiteenzetten, dat dit niet wenselijk is, en niet in het belang van onze organisatie. Een verlaging met 2½ cent per lid en per maand betekent een verminderde opbrengst voor de Federatiekas van f 1500.— terwijl dat voor de meeste afdelingen een niet noemenswaardige verbetering brengt, n.l. van slechts f 0.30 inkomsten per jaar meer per lid. Maar als men de contributie niet verlaagt, hebben de leden zelf van die verlaging der afdracht aan de Federatiekas geen voordeel. Bovendien vergeet men steeds altijd weer, dat voor de nieuwe leden eerst contributie betaald wordt vanaf het kwartaal, volgend op dat van inschrijving der nieuwe leden. Hetgeen 3 of 2 maanden contributiewinst voor de afdelingen betekent.
Het Fed.-bestuur meent dan ook, dat het beter is die afdelingen en districten die dat werkelijk nodig hebben, financieel te steunen. Bij verlaging der contributie kan dat niet meer in die mate gebeuren. Wie zich de moeite getroost de cijfers te bestuderen, zo gedetailleerd als in de gehele Esperantobeweging slechts onze Federatie ze levert, kan daaruit heel wat leren.
Ten eerste, dat slechts 3 districten er zonder directe steun niet konden komen en met f 167.59 geholpen waren, terwijl 6 afdelingen kans zagen met een lening te volstaan ad f 145. Voor dit jaar hebben we f 300 uitgetrokken. Maar alle afdn profiteerden tenslotte van de f 500 die we toelegden op het propagandamateriaal, dat we soms nog gratis of voor halve prijs leverden.
De kleine afdelingen dienen hierbij te bedenken, dat zij mede profiteren van het gezamenlijk laten drukken van het propaganda-materiaal, dat zo goedkoop kan zijn door het grote kwantum. Verder waren we in staat f 65 subsidie te verlenen aan twee zangkoren en een theatergroep en voor ons taalkundig maandblad „La Progresanto" f 374.67 uit te trekken. Op jubileumboek en kalender legden we f 450 toe; al met al makende een som van f 1500, juist het bedrag, dat men de Fed.-kas wil ontnemen.
Ook ons kinderblad „La Vojo" zal dit jaar een subsidie nodig maken van f 250. De som die, dit jaar voor 't eerst, nodig zal zijn om het tekort te dekken op de reis- en verblijfkosten der congresafgevaardigden taxeren we op f 250.
Wil men de inkomsten der Federatie met f 1500 besnoeien, dan zullen we vele dezer dingen moeten laten.
Wie hiervoor de verantwoording wil nemen, het Federatiebestuur niet!
Met een voorstel om de post kantoorbehoeften, die nog geen f 400 bedraagt(!), te verminderen, komt men er niet. Op deze post valt *niet* te bezuinigen, omdat elke uitgave een noodzakelijke is, als: schrijfmachine f 65, briefpapier, enveloppen, briefkaarten e.d., f 125 benodigdheden voor schrijfmach., adresseermachine, enz. f 44, bindwerk f 30 en f 125 uitgegeven door 8 bestuurders en helpers in een heel jaar voor alle mogelijke kleine benodigdheden die iedereen zich kan indenken, waarvoor wij ons schamen hierover te moeten praten.

#### Ons orgaan.

Een ander voorstel, om LE goedkoper te doen drukken, wekt slechts de schijn, dat het Fed.-bestuur in deze onverantwoordelijk handelt. Het is voor geen enkele georganiseerde drukkerij mogelijk het orgaan over te nemen tegen een lagere, wel tegen een hogere drukprijs. Men vergete ook niet, dat het hebben van meerdere drukkers voor zijn drukwerk niet wenselijk is. Coulante en vlugge bediening, crediet en overige eisen die men stelt zijn eerder verzekerd bij een goed geoutilleerde drukkerij, waar men regelmatig zijn drukwerk heeft, dan wanneer men soms bij deze dan bij gene terecht moet, waardoor het bijv. ook mogelijk was ons te dekken tegen verhoging van de papierprijs, daar we voor een heel jaar konden laten inslaan voor onze organen. Het drukken van het orgaan buiten de stad waar de redacteur woont, is eveneens voor een behoorlijke verzorging niet mogelijk. Bezien we de lijst van organisaties die bij Dico laten drukken, dan blijken we in goed gezelschap te zijn.
We zijn even op dit voorstel ingegaan, hoewel we moeten opmerken, dat dit geen materie is voor behandeling door de leden, die daarvan immers onkundig zijn. Dat is vanzelfsprekend in elke organisatie een bestuurszaak.
Houdt men van cijferen, dan blijkt, dat in 1934 L E kostte 54 cent per jaar voor 110 pag., in 1935 voor 124 pag. 56 cent en in 1936 met 144 pag. f 3443.77 (drukkosten), dus weer maar 54 cent als in 1934 bij 110 pag., gevolg van het groter oplaagcijfer.
Bezien we overigens de cijfers goed, dan zal men bemerken, dat onze Federatie niet bestaat alleen van de contributie, maar doen kan wat ze doet, mede door haar Libro-Servo, die f 2500 in de Fed.-kas kon storten.
De contributie der Federatie is de laagste van de esperantoverenigingen en zeker niet hoger dan van andere culturele organisaties, terwijl onze Federatie veel meer biedt, haar leden gratis twee maandbladen verschaft en een studieblad beneden kostprijs.
Met trots kunnen wij er op wijzen,

dat wij nooit een beroep deden op de financiële offervaardigheid onzer leden, wat bij anderen regelmatig voorkomt en het effect van lage contributies te niet doet; wij van geen enkele organisatie enige subsidie ontvangen, iets waarvan de meeste culturele organisaties wel afhankelijk zijn.

**Federatieraad.**

Nog een voorstel is er, dat bezuiniging beoogt, dat wij echter moeten beschouwen als van afbrekende aard, n.l. de voorgestelde bezuiniging op de Federacia Konsilantaro, waarvoor de uitgaven voor 2 vergaderingen in het geheel f 277.45 vorderden, waarvan f 222.75 reiskosten. Minder vergaderen dan twee keer per jaar is niet mogelijk en de F.K. geheel opheffen, hetgeen slechts de bedoeling kan zijn, zou blijk geven van grove kortzichtigheid. Wij zien in dit regelmatige contact met vertegenwoordigers der provinciale en stedelijke districten meer voordeel uit organisatorisch oogpunt, dan nadeel voor de kas. Overigens is het een nog jonge instantie wier werkzaamheden zullen groeien naarmate ze meer gewaardeerd wordt. In een afzonderlijk artikel zullen wij het hierover nog wel eens hebben.

Trouwens andere voorstellen, bijv. om het bestuur uit te breiden met leden buiten Amsterdam, zouden deze z.g. voordelen weer te niet doen en minder nut hebben, daar deze niet ons gehele gebied vertegenwoordigen. Het Federatiebestuur waarschuwt dan ook nadrukkelijk tegen contributieverlaging en kan de verantwoordelijkheid hiervoor niet dragen. Een organisatie met lage, vooral te lage, contributie zal nimmer bloeien noch enige invloed verkrijgen.

**Federatiebestuur.**

Vandaar dan ook, dat het Federatiebestuur er de voorkeur aan geeft de leiding aan anderen te laten, als men meent dat de belangen op de wijze als de voorstellers beogen, beter zullen worden gediend. Dit heeft niets te maken met een zucht naar dictatoriaal handelen, zo als ons een afd. verwijt. Dictators hebben de eigenschap hun wil op te leggen, niet om voorstellen te doen waarover men vrijelijk kan discussiëren. Zij leggen geen rekenschap of verantwoording af. Zouden zij hun aanblijven doen afhangen van het al of niet aannemen van enig voorstel, dan zou hun geen lang leven als bestuurder beschoren zijn. In democratisch geregeerde landen zal het landsbestuur aftreden, indien voorstellen worden aangenomen waarvan het de verantwoordelijkheid niet kan aanvaarden. Dit recht hebbe ook het Fed.-bestuur. Maar, wat zou het congres wel zeggen, als het Federatiebestuur eerst in het congres zijn aanblijven zou doen afhangen van zekere voorstellen? Stelt men prijs op het tegenwoordige bestuur, dan zal men het in staat moeten stellen onze beweging te blijven leiden.

Als uiting van zijn wens om daarbij te rade te kunnen gaan bij de leden zelf, diene het handhaven van de Federatieraad, die wel niet volmaakt is, maar steeds beter zijn taak zal gaan vervullen. In plaats van beperking wensen we uitbreiding van onze bemoeiingen. Vandaar dan ook ons voorstel iemand uit het tegenwoordige Federatiebestuur te salariëren, opdat hij des daags de beslommeringen onzer beweging kan behartigen. Deze bestuurder geeft daarvoor zijn tegenwoordige werkkring op en wij stellen er dus prijs op, dat zijn functie niet afhankelijk zij van zijn al of niet verkiezing als bestuurder. Andere Federatiebestuurders, die voor deze taak in aanmerking zouden komen, wensen hun positie niet in de waagschaal te stellen. Dat zij geen ongelijk hebben, blijkt bijv. wel uit een amendement dat wil, dat slechts overgegaan wordt tot de aanstelling van een betaalde kracht, nadat de contributie verlaagd is. Alsof juist niet mede hierom de contributie dient te blijven zo ze is. Telt het belang van de organisatie die afdeling dan zo weinig? Of meent ze dat men nog meer en langer op de Federatiebestuurders kan roofbouwen?

Men houde zich er van verzekerd, dat daaruit niets meer te halen valt.

**Vooruit.**

Achteruitgaan mogen we niet, stilstaan willen we niet, we moeten vooruit en daarvoor is één betaalde kracht zelfs niet genoeg. Afhangen van hulp, die naar de wens van deze helpers elk ogenblik kan ophouden, omdat zij vrijwillig is en waarvoor men niemand ter verantwoording kan roepen, mag een organisatie van de omvang als de onze nu is, niet. Geen enkele organisatie van ongev. 5000 leden, wier ledental jaarlijks toeneemt, en meer dan 150 afdelingen telt als onze Federatie, die met zijn Libro-Servo, een kasomzet heeft van 30.000 gulden, een eigen uitgeverij en boekhandel waarin 85.000 boeken en brochures (eigen uitgaven) moesten worden verzorgd, waarvan 43.000 verkocht en verzonden, behalve alle andere uitgaven, in totaal meer dan een millioen stuks, en duizenden boeken van andere uitgevers in binnen- en buitenland door ons geëxpedieerd, kan zich veroorloven het zonder zelfs één betaalde kracht of zelfs maar een bescheiden vergoeding, te stellen. Men bedenke hierbij nog, dat hetzelfde bestuur enkele dezer boeken en werkjes zelf samengesteld en gecorrigeerd heeft, de andere uitgaven bestudeert, gedeeltelijk corrigeert, zelf, zonder enige hulp, zijn drie maandbladen Laborista Esperantisto, La Progresanto en La Vojo redigeert en corrigeert, ze voor een groot deel zelf vult en expedieert, in dit laatste werk soms door enkelen geholpen. We hebben ons werk in de examen-commissie en andere commissies, de grote pers wordt verzorgd, enz. enz.

De administratie en het secretariaat, welke laatste alleen reeds 3000 stuks correspondentie en 4800 drukwerken verzond en resp. 3100 en 900 ontving in 1936, nemen met de dag in werkzaamheid toe. Is het nodig nog meer te noemen, om te doen begrijpen *hoe nodig* het is, dat stappen worden gedaan om dat alles zelfs beter nog te doen functioneren?

Van de tegenwoordige bestuurders kan niet meer worden verwacht, wel minder. Uitbreiding is haast niet meer mogelijk, omdat de werkzaamheden niet gemakkelijk meer kunnen worden verdeeld. Eerder nog is centralisatie gewenst met een bureau of kantoor.

**Buiten Amsterdam.**

Werkzaamheden aan bestuurders buiten Amsterdam overlaten is maar heel weinig mogelijk, daar dan ook het regelmatig contact te wensen laat. Toeziende of adviserende bestuurders hebben we niet van node, wel werkende. Bestuurders buiten het Fed.-bestuur bezitten we al in de Fed.-raad. Hun een speciale functie opdragen is bijna niet mogelijk. Het verlicht de werkzaamheden van het Fed.-bestuur ook niet, maar zal ze eerder verzwaren door het onvermijdelijke heen- en weergeschrijf. Zij die voorstellen, dat het Dagelijks Bestuur alleen in Amsterdam zij en voor 't overige in het land, begrijpen van het Fed.-bestuurswerk niets. Wel beschouwd is het gehele tegenwoordige bestuur een dagelijks bestuur. Wat wil men, een 2e secretaris, een 2e penningmeester, de administrateur, mensen die elkaar met het overige bestuur dagelijks nodig hebben, ergens in het land, verwijderd van elkaar? Zoiets is niet wenselijk en zo al, alleen maar mogelijk als de bestuurders in het land geen bepaalde functie behoeven te vervullen en de lopende werkzaamheden geschieden op een bureau met personeel onder dagelijkse leiding van een of meer gesalarieerde bestuurders. Het leek ons juist op dit punt wat uitvoerig te zijn, zodat men te voren onze argumenten kent en herhaling in 't congres overbodig mag worden geacht. Het tegenwoordige Federatiebestuur,

dat met de werkzaamheden opgegroeid is, vreest, dat een nieuw gekozen bestuur al het werk niet zal kunnen of willen afdoen. De moeilijkheid om af te treden, nu verscheidenen van hen dat zouden wensen, omdat zij vrezen, dat de werkzaamheid der Fed. zal lijden, doet ze op hun post blijven. Maar er dient gezorgd te worden, dat vervanging mogelijk is. Zo niet, dat dan het congres hiervan de verantwoordelijkheid drage.

**Commissies.**

Het instellen van commissies verlicht de taak van het Fed.-bestuur niet. Integendeel. Op de werkzaamheid van commissies moet het Fed.bestuur niettemin toezien. Wie garandeert, dat daaraan dezerzijds toch geen leiding gegeven moet worden? Dat in een culturele organisatie, als ook de onze is, alleen het organisatiewerk tot de competentie behoort van haar bestuur zoals Rotterdam XI meent, is ten enemale onjuist. Wij hebben leiding te geven ook in cultureel opzicht. Schieten we daarin te kort, men bewijze, dat een commissie dat beter doet. Wat tot nog toe tot stand kwam, daarop kan het Fed.-bestuur met enige trots terugzien. Van enige commissie echter heeft het Fed.-bestuur de ondervinding, dat deze tot vertraging inplaats van bespoediging leidde en het dan nog beslissen moest tussen verdeelde meningen, welke altijd blijven bestaan bij de beoordeling van leer- en studiemiddelen.

**Leerboeken.**

Wat deze betreft, als bijv. blijkt, dat behoefte bestaat aan meer dan één soort leerboek, dan is daarvoor te zeggen. Men rekene er echter mee, dat de oplaag zeer sterk de prijs beinvloedt. Waar elk leerboek zijn voor en tegen heeft, maar men uit elk boek nochtans Esperanto leert (dit is althans mijn persoonlijke mening, Red. L E) zal men goed doen het aantal uitgaven tot zo weinig mogelijk te beperken. Het latere studiemateriaal kan uitgebreider zijn.

**Libro-Servo.**

Voor hen die uit de Libro-Servo zoveel mogelijk profijt wensen, zij nog eens medegedeeld, dat alleen op eigen uitgaven korting kan worden gegeven. Op die van andere uitgevers is dat verboden. Ook een boekhandel mag dat niet doen. Wie dat wel doet, haalt zich de kans op uitsluiting van levering op de hals, hetgeen ons reeds bedreigde toen we een paar jaar geleden een serie boeken goedkoper leverden. Zij die om 10% te ontvangen, zoals enkele afdn doen, toch van zo'n boekhandel betrekken, bedenken dan dat zij zich zelf een kleine winst bezorgen, maar de overige procenten aan de Fed. ontfutselen, wier Libro-Servo niet zou floreren als alle afdn. zo handelen zouden. Men zie dan eens naar de Libro-Servo van LEEN, die van zijn leden steun vraagt van f 1 tot f 0.25 per lid, inplaats van, als wij aan de Fed.-kas, een paar duizend gulden uit te keren, terwijl wij onze 20-30% korting op eigen uitgaven verleenden.

Eindigen we met van het voorstel Amsterdam XVII te zeggen, dat een reglementsartikel om fascisten uit de Federatie te weren, overbodig is. Het is vanzelfsprekend, dat deze elementen in een organisatie, die streeft naar ontwikkeling en internationale broederschap, niet thuis horen en bij ons niet geaccepteerd worden.




**Surprizoj** (Wat komen zal) de Ina Boudier-Bakker, el la nederlanda lingvo tradukis Tekla Flint. Eldonejo: Esperanto-Instituto „Isosek" Heerlen. Nederlando. Prezo: broŝ. f 2.—; bind. f 2.50.

Simpla rakonto pri knabino, kiu forlasis la gepatran domon por memstare vivi. Ŝi renkontas junulon, kun kiu ŝi ekvivas konkubine, sed kiam li, post ŝia gravediĝo, malaperis, ŝi devas bati al si vojon tra la vivo kune kun la infano....

Legante pri tio, oni demandas al si, ĉu la tradukintino ne povis trovi en la nederlanda literaturo verkon pli indan por esti mondskale disvastigata per Esperanto. Sed aliflanke oni ne povas bedaŭri tion, ĉar el ĉi tiu traduko montriĝas, ke ŝi ne estas sufiĉe kompetenta por entrepreni tiom gravan laboron. Estas klare, ke ŝi ne studis la verkojn de niaj eminentaj verkistoj, ne proprigis al si iliajn stilon kaj esprimmanieron. Tro laŭvorte ŝi sekvis la originalon kaj pro tio ofte ne precize redonas la pensojn de la verkistino aŭ esprimas ilin malklare kaj malfacile kompreneble.

Ne estas eble mencii ĉiujn erarojn, nekorektaĵojn kaj malglataĵojn, svarmantajn en tiu ĉi libro. Ĉar oni tamen deziras en recenzo specimenojn de la kritikindaĵoj, mi citos kelkajn:

Pĝ. 33: Sed kial do vi ne demandas *ĝin* (= tion). Vi mensogas — estas *jes* vere (= estas efektive vere).

Pĝ. 33: Li neniam plu demandis pri tio; sed li *jes* rimarkis ŝian malamikecon (= sed li bone rimarkis ŝian malamikecon.)

Pĝ. 33: Ŝi nun daŭre forpuŝis lin, *ĉiu* sia natura, infane-karesema mildeco estis for (= sia tuta natura ktp.)

Pĝ. 35. Ŝi timis tion pro sia infano; kiam ŝi pripensis, ke ĝi estas grandiĝonta sen patro, eksteredzeca infano, ŝi povus kriegi pro mizero (= ....ke ĝi, eksteredzeca infano, kreskos sen patro, ktp.)

Pĝ. 41: Ŝi kroĉis sin al li per *ĉiu* sia pezo (= per sia tuta pezo.)

Pĝ. 47: ....vi *jes* diris, (= u zei wel) ke la sinjoro estas vojaĝanta, sed tio do (= ja) ne estas lia profesio (= kvankam vi diris, ke.... ktp.)

Pĝ. 54: La sinjorino daŭrigis paroli (Post daŭrigi devas sekvi substantivo, do: daŭrigis la paroladon. (Vidu „Lingvaj Respondoj").

Pĝ. 63: ....kaj vi ricevos bonan flegadon.... kaj la infano ankaŭ ricevos, kion ĝi bezonas (= kaj ankaŭ la infano, ktp.)

Se ĉi supraj kritikindaĵoj estus la solaj, ili ne multe ĝenus la leganton. Sed bedaŭrinde ili abundas.

Abundas ankaŭ stilaj malbelaĵoj, ekz.:

Pĝ. 68: Fraŭlino Bes (d. e. *sinjorino*, ĉar ŝi estas vidvino nur en Nederlando oni titolas edziniĝintan virinon el la popola klaso „fraŭlino") estis zorgoplena kaj afabla *al ŝi*. Ŝi alportis manĝaĵojn *al ŝi*, ĉar Trees nun ne povis zorgi pri tio kaj vespere ŝi restis horeton *kun ŝi*.

Pĝ. 69: „.... kial vi estas tiel ekscitita?" li demandis, prenante *ŝian manon*. Ŝi kapneis, liberigante *sian manon*.

Pĝ. 69: Li klinis *sin* super *ŝin*, atente observante *ŝin*.

Participajn formojn, kiuj faciligas la stilon, la tradukintino preskaŭ tute ne uzis. Pro tio oni ofte renkontas relativajn pronomojn.

Ankaŭ la bonsoneco ne havis ŝian atenton. La siblaj sonoj c, ĉ, ĝ, ĵ, s, ŝ tro ofte sekvas unu la alian, ekz.:

Pĝ. 71: ....ŝi rigardis al la amaseto da infanvestoj, ĝis io komencis turniĝi ĉirkaŭ ŝi kaj ŝi ŝanceliĝante serĉis apogon.

Pĝ. 51: Ĝi estis la unua, kion ŝi vidis, matene kiam ŝi vekiĝis, vespere kiam ŝi venis hejmen. Kiam ŝi nokte vekiĝis, ŝi etendis sian manon kaj pripalpis la molajn litkovriletojn, — post tio ŝi ree endormiĝis, tenante ion de ĝi en la mano. Sed vespere ĝi estis ŝia plej granda feliĉo. Tiam ŝi sidis ĉetable apud la lulilo, kudrante la etajn vestojn. Kaj ŝi imagis, ke la infano jam naskiĝis, ŝi dolĉe babiladis al ĝi, donis al ĝi karesnomojn....

En tiuj malmultaj linioj ni renkontas dekfoje la vorton *ŝi*, krome kelkfoje la similsonan *ĝi*. Bona tradukanto lerte evitas tion.

Tiu ĉi verketo superis la fortojn de la tradukintino kaj ni sincere bedaŭras, ke ni devis malfavore recenzi ĝin. Sed la tradukado estas arto ne malpli grava ol la verkado mem kaj nesperta tradukanto ne honoras la verkinton. F. F.

---

**La Laborista Esperanta Movado antaŭ la Mondmilito.** Faktoj kaj dokumentoj kolektitaj de G. P. de Bruin, 36 pĝ., 15 x 21 cm. Eld.: SAT, Paris. Prezo: 1.50 fr. fr. plus 10 5 por afranko.

En facile trarigardebla formo la Esperanto-historiisto De Bruin prezentas al ni laŭeble plej klaran bildon pri la laborista Esp.-movado antaŭ 1914a. Tiu ĉi bildo neniel similas la nunan Esp.-movadon inter laboristoj kaj la evoluo de la nuna el la tiama movado ne okazis tiel glate kiel en la neŭtrala kampo.

Jam antaŭ la mondmilito la diverslandaj laboristoj iris sian propran vojon, ignorante la t. n. neŭtralan movadon, sed mankis certa kontakto inter ili.

Speciale interesas la malforta movado en Nederlando, el kiu nur en la lasta jardeko elkreskis nia nuna forta organizo.

Lingvaĵo kaj tipografia aranĝo estas bonaj. G. J. D.

---

**Juneca Ardo,** originala rakonto de N. Bartelmes. 120 pĝ., 13½ x 19½ cm. Eld.: SAT, Paris. Prezo: 7.50 fr. fr. plus 10 5 por afranko.

Originala rakonto pri du knaboj, edukitaj en konfuze politika sfero, forte impresanta ilian junecon. Politika agado de needukospertaj plenaĝuloj facile influas infanojn en neĉiam bona senco. La junecaj bildoj en tiu ĉi libreto do prezentas jen infanan senzorgecon kaj freŝe junan vivoĝojon, jen animstatojn preme influatajn de l' ĉirkaŭanta malserena sfero.

La rakonto estas verkita de iu, kiu seniluziiĝis pri la agado de sia politika organizo, tamen ne perdanta fidon en la fina trumifo de l' socialismo.

La stilo estas flua, korekta kaj diversloke traplektita per tre rimarkindaj esprimoj. Nur kelkloke enŝoviĝis, evidente forgese faritaj, gramatikaj eraroj.

Plue: plaĉa eksteraĵo kaj agrabla preso.

G. J. D.

# TAGORDO POR LA 22^A KONGRESO

de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj (en la regiono de la nederlanda lingvo) okazonta la 27an kaj la 28an de Marto 1937 en "Vooruit" St. Pieters Nieuwstraat Gent.

Malfermo je la 14.30 horo.

Akcepto de kongresanoj; ekskursoj; ktp.

Je la 19.30 horo interkamarada vespero.

*Dimanĉon, la 28an de Marto.*

Je la 9a promenado.

Je la 11a oficiala akcepto fotografado.

Unua kunsido.

Malfermo je da 14.30 horo.

1. Malfermo kaj salutoj.
2. Raporto sekretario.
3. „ kasisto.
4. „ Libro-Servo.
5. Fermo.

Dua kunsido.

Malfermo je la 19.30 horo.

1. Proponoj kaj amendoj.
2. Budĝeto.
3. Fermo.

*Lundon, la 29an de Marto.*

Tria kunsido.

Malfermo je la 9.30 horo.

1. Elekto Fed. Estraro.
2. „ Konfliktkomitato.
3. „ Kongresloko 1937.
4. „ Kaskontrolkomitato.
5. Fermo.

Poste ekskurso.

(Ŝanĝoj rezervitaj.)

Apartaj kunsidoj estos en la kongreso anoncataj.

## POSTE RICEVITAJ PROPONOJ.

(Proponoj ricevitaj post la 6a de Februaro ne plu estis akceptitaj; la limtempo jam pasis la 31an de Januaro.)

**REGULARO.**

**Sekcioj Rotterdam V kaj XIII.**

La artikolo 13c de la Federacia Regularo tekstu jene:

„De leden van het Dagelijks Bestuur moeten in de zelfde plaats woonachtig zijn."

KLARIGO:

Ni opinias, ke la kaŭzoj, pro kiuj oni akceptis tiun artikolon ne plu ekzistas. La federacia aparato estas nun sufiĉe forta por porti vojaĝelspezojn. Ni kredas, ke se en la federacia estraro estus kelkaj membroj el aliaj lokoj, tio plibonigus la harmonion inter la fed.-estraro kaj distriktoj aŭ sekcioj.

Prezidanto, sekretario, kasisto kaj redaktoro (eventuale ankaŭ la libro-servisto) loĝu en unu loko.

(*Rimarko fed.estraro*: La fed.-estraro konsistas el la ĉefestraro (en A'dam) kaj la anoj de la konsilantaro. Vidu la jarraporton de la sekretario pri la Federacia Konsilantaro paĝon 3 de L E Januara numero).

**Sekcio R'dam XIII.**

Aliigi en art. 13a. la ciferon 5 en 7.

**Sekcio West-Graftdijk.**

1. En la 13a art. c. de la regularo ni ŝanĝu la alineon: „Zij treden elk jaar af, doch zijn terstond herkiesbaar", jene: „Elk jaar treedt een derde van het bestuur af en de afgetredenen zijn niet terstond herkiesbaar".

KLARIGO:

Se iu persono daŭre estas estrarano li pli kaj pli perdas la kontakton kun la movado. Tio kaŭzas, ke la estraro finfine funkcias ne plu kiel necesas, kaj endanĝerigas la federacion sufiĉe grave.

Pro tio ni opinias necese, ke ni havu ĉiutri-jare novan estraron, kaj ke ĉiu estrarano post trijara funkcio denove partoprenu en la sekcia laboro.

2. En la 13a art. c. de la regularo ni ŝanĝu la alineon: „Alle bestuurders moeten in dezelfde plaats woonachtig zijn", jene: „Het bestuur zij zoveel mogelijk verspreid over het gehele land."

KLARIGO:

Por ke la estraro havu daŭran kontakton kun la tuta movado ni konsilas, ke ĝi loĝu kiom eble plej dise en la lando. Tiel oni krome evitos, ke la estraro fariĝos apartajo en la federacio, ĉar tiam la estraranoj havos kontakton, almenaŭ pli kun la sekcioj ol kun la aliaj estraranoj, kio certe favoros al nia movado.

(*Rimarko fed.estraro*: Ne ekzistas bazo nek pruvo por aserto, ke eĉ unu el niaj estraranoj, kiuj jam dum multaj jaroj seninterrompe disponigas sian plej lastan liberan minuton, sian tutan energion, sian hejman vivon, sian laborpovon kaj sian amon por nia konuma afero, perdas la kontakton kun la tuta movado. Se tia estraro efektive fariĝus apartaĵo en la federacio, tio ne pledus por la cetera anaro de la Federacio.)

**LABORISTA ESPERANTISTO.**

**Sekcio Emmen.**

En L E estu presotaj felietonoj; pli malpli longaj esperantlingvaj rakontoj.

KLARIGO:

La redaktadon de L E ni trovas bonega. Tamen ne ĉiuj interesiĝas pri asociaj aferoj. Tial ni preferas dediĉi parton de L E por rakontoj, por ke ĝi fariĝu ankoraŭ pli interesa.

(*Rimarko fed.estraro*: Niaj anoj ricevas senpage „L E"n, „S-ulo"n kaj „La Lernanto"n. Kune do multe da vario. Kontentigi ĉiujn ne eblas.)

**DIVERSOJ.**

**Rotterdam VIII.**

a. Ingrijpende resoluties, besluiten, **dewelke de vrijheid der leden sterk aantasten**, worden in 't vervolg, als bijlage toegevoegd en gelegd in het federatie-reglement. Geen enkele afdeling verzuime dit.

b. Voor preciese redactie van besluiten is het nodig, dat nederlandse tekst wordt gebruikt.

KLARIGO:

Opdat alle leden van zulke resoluties en bepalingen op de hoogte zullen zijn, legge men deze als bijlage in het statutenboekje.

(*Rimarko fed.estraro*: vidu ankaŭ proponon aperintan en antaŭa numero de L E. Cetere neniu sekcio povas aliĝi ne subskribinte la konvencion kun SAT kaj la „A. R."n.)

**KANDIDATOJ FED.-ESTRARO.**

Sekcio Amsterdam V proponas: kdon W. F. Kruit.

Kdo Kruit nur akceptas kiam almenaŭ la pli granda parto de la nuna estraro restos.

Sekcio Amsterdam III prop. kdon F. de Vries.

Sekcio Amsterdam IX prop.: kdon D. Meyer.

**KOREKTO.**

La 3 proponoj pri L E kaj L S sub kapo de la sekcio A'dam XI (L E de Februaro) devas esti legataj kiel ensenditaj de sekcio A'dam II.

## AMENDOJ AL LA KONGRESPROPONOJ.

**ESTRARO.**

**Sekcio Vlaardingen.**

La kongreso akceptu la estrarproponon pri dungo de pagita funkciulo kondiĉe, ke post akcepto de la proponita kotiz-malaltigo ĝis 15 cendoj monate nia financa stato ebligos la elspezon.

**Sekcioj Hilversum kaj Rotterdam V.**

La salajrota estrarano nur estu oficisto de la Federacio, kiu rajtas partopreni la estrarkunvenojn, sed li havu nur konsilan voĉrajton.

KLARIGO:

Ne ĝustas laŭ ni, ke unu estrarano ricevas rekompencon por sia laboro kaj la aliaj devas labori senpage. Tial ni opinias, ke la salajrulo ne estu estrarano, sed oficisto.

**Sekcio Groningen.**

La kongreso rajtigu la Fed.-estraron dungi kontoriston, kies laborkondiĉoj estu fiksataj interkonsente kun la kontorista sindikato.

KLARIGO:

Sekcio Groningen havas la impreson, ke la laboro de la elektota funkciulo estas nur administra. Tial oni elektu kontoriston.

Decas, ke tiu en lab. organizo ricevu salajron laŭ sindikataj kondiĉoj.
Krome la Fed.-estraro donu al ĉiuj anoj okazon oficpeti, por kiu ajn funkcio en la Federacio.
(*Rimarko fed.estraro*: La fed.-estraro ne decidas, sed proponas al la kongreso laŭ praktikaj konsideroj pri ĉi afero).

## „LABORISTA ESPERANTISTO."

**Sekcio Amsterdam III.**

Al prop. 2a de sekcio Den Helder.
La frazo: „Kio estas interesa por ni ĉiuj kaj forlasu la reston" estu ŝanĝata jene: „kio estas necesa por la koncerna sekcio, tamen restu la kerno".

**Sekcio Amsterdam IX.**

Al propono 1 de sekcio Hago I.
A'dam 9a, konsiderante la neceson, ke la gazeto devos resti presata en organizita presentrepreno, tamen opinias, ke la prezo povos esti malaltigata kaj proponas, ke post la finiĝo de la kontrakto kun la presejo, la Fed. proponos la presigon de la gazeta je plej favora prezo (kun prefero al Dico).

## STARIGO DE KOMITATOJ.

**Sekcio Rotterdam XIII.**

Al propono 2 de sekcio Rotterdam II.
Ni ne ŝatas kunlaboron de aliaj esp.-organizoj.
Ni preferas memstaran laboron sur tiu tereno, por estonte eviti malfacilaĵojn en la tre utila laboro de tiu komitato.

**Sekcio Hago X.**

Al propono 2 de sekcio Rotterdam II.
Aldonu, krom la tri nomitajn personojn, k-don P. J. Makkinje (Hago).

**Sekcio Den Haag II.**

Al propono 3 de sekcio Den Haag X.
Opiniante, ke la esenco de la propono de sekcio Haga X ja estas tre valora kaj, ke la jam pli malpli farita laboro de F L E estraro ne estas tutsama, kiel tiu esenca celo, ni proponas, ke anstataŭ fondi komitaton, la kongreso deziresprimu, ke ano el la F L E-estraro aŭ konsilantaro estu okupata per tiu tasko. Tiu ano serĉu libervolajn kunlaborantajn el la tuta lingvoregiono.

## LERNOLIBRO.

**Sekcio Hago X.**

Al propono 3 de sekcio Rotterdam II.
